

DUA ORDINARA DIMANĈO -17a de januaro 2010

ĈI TIUN KOMENCON DE SIGNOJ JESUO FARIS EN KANA GALILEA- Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Joh. 2, 1-11

[En tiu tempo] la trian tagon okazis edziĝo en Kana Galilea, kaj la patrino de Jesuo ĉeestis tie; ankaŭ Jesuo kaj liaj disĉiploj estis invititaj al la edziĝo.

Kaj kiam mankis vino, la patrino de Jesuo diris al li: Ili ne havas vinon. Kaj Jesuo diris al ŝi: Kio estas inter mi kaj vi, virino? mia horo ankoraŭ ne venis. Lia patrino diris al la servantoj: Kion ajn li diros al vi, tion faru.

Kaj estis tie ses akvokuvoĵ ŝtonaj, metitaj laŭ la purigo de la Judoj, enhavantaj po du ĝis tri metroj. Jesuo diris al ili: Plenigu la akvokuvojn per akvo. Kaj oni plenigis ilin ĝis la rando. Kaj li diris al ili: Ĉerpu nun, kaj alportu al la festenestro. Kaj oni alportis.

Kiam la festenestro gustumis la akvon, nun fariĝintan vino, kaj ne sciis, de kie ĝi estas (sciis tamen la servantoj, kiuj ĉerpis la akvon), la festenestro alvokis la fianĉon, kaj diris al li: Ĉiu homo prezentas unue la bonan vinon, kaj kiam oni jam drinkis, tiam la malpli bonan; sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun. Ĉi tiun komencon de signoj Jesuo faris en Kana Galilea, kaj elmontris sian gloron, kaj liaj disĉiploj kredis al li.

Dum la legado de la evangelipeco ni devas sekvi kaj atenti tiujn interpretojn, tiujn terminojn kiujn la evangeliisto enmetas en la rakonton por komprenigi al ni la signifon de tio kion li volas komuniki al ni.

Ĉi tie ni havas la 2an ĉapitron de la Evangelio laŭ Sankta Johano, la epizodon konatan kiel “La nupto en Kana”. Ni vidu. “La trian tagon”, jen, ekde la komenco la evangeliisto metas tie ĉi tiun tempan lokiĝon. En la evangelioj kiam ni trovas apartaĵojn kiuj en si mem ne ŝajnas al ni tre signifaj por la kompreno de la teksto – al ni ke tiu nupto okazis la trian tagon, la kvaran aŭ la duan tagon preskaŭ nenion gravas – vere temas pri altvaloraj teologiaj indikoj.

Kial la trian tagon? En la hebrea tradicio la tria tago estis la tago de la interligo, kiam Dio aperis sur la monto Sinajo, laŭ la Libro de Eliro. Do, la evangeliisto enmetas, ekde la komenco, tiun evangelipecon sub la ŝildon de la interligo, ĉar, kiel ni vidos, li proponos novan interligon per Jesuo.

“Okazis edziĝo”, jam estas tie tiu alia vorto “la edziĝo”. Ni scias ke la rilato inter Dio kaj Lia popolo estis bildigita kiel geedziĝo; Dio estis la edzo, kaj Izraelo estis la edzino. “En Kana Galilea kaj la patrino de Jesuo ĉeestis”. Tiu rolanto aperas la unuan fojon, li aperos trifoje ĉi tie sed ĉiam sen sia nomo.

Tamen Sankta Johano scias ke la nomo de la patrino de Jesuo estas Maria – kiam la evangeliistoj enmetas la rolon de homo sed sen nomo, tio signifas ke temas pri signifoplena rolanto. Kaj ni vidos kiu estos la signifo de tiu rolanto kiu estas la patrino de Jesuo.

Dum la patrino apartenas al tiu ĉi edziĝo, al tiu ĉi interligo, Jesuo ne apartenas al ili. Jesuo estis invitita “kun siaj disĉiploj. Kiam mankis vino”, jen la malfeliĉaĵo. En la ceremonio de la geedziĝo kulmina momento estas kiam la du geedzoj trinkas el la sama glaso da vino; la vino estas simbolo de la amo.

Nu, en tiu geedziĝo kiu estas simbolo de la interligo inter Dio kaj Lia popolo, mankas la plej grava elemento, nome mankas la amo. Kiam mankis vino, la patrino de Jesuo diris al li: “Ili ne havas vinon”. La patrino ne diras, kiel en malnova traduko:”Ili ne plu havas vinon”, la vino neniam estis. Kaj ŝi eĉ ne diras: “Ni ne plu havas vinon”, ĉar la Izraelo fidela ĉiam konservis kun Dio tiun amrilaton, do ĉiam estis la vino de la amo, sed ŝi maltrankviliĝas pro la homamaso: “Ili ne havas vinon”, do ŝi turnas la atenton de Jesuo al la popolo, al la kondiĉo de la popolamaso.

“Kaj Jesuo diris al ŝi: Kio estas inter mi kaj vi, virino?” aŭ laŭlitere “Kion al mi kaj al vi, nome kion tio interesas al vi kaj al mi? Estas strange ke Jesuo sin turnas tiamaniere al la patrino per la nomo “virino” kiu estas uzata por edziniĝinta virino kaj signifas “edzino”.

En la Evangelio laŭ Sankta Johano Jesuo sin turnas per tiu ĉi nomo al tri virinaj rolantoj, kiu simbolas la edzinojn de la interligo. La unua, kiel ni jam vidis, estas la patrino, estas la fidela edzino de la Malnova Testamento el kiu devenas la Mesio, la Kristo, Jesuo. La dua estas la samarianino, la malfidela edzino, la adultulino kiun la edzo rekonkeros per la oferado de amo eĉ pli granda. Finfine, la tria estos Maria Magdalena la edzino de la nova interligo.

Do, Jesuo sin turnas al ŝi per tiu esprimmaniero por revoki ŝian rolon de edzino de la interligo. “Mia horo ankoraŭ ne venis”, la horo de la interligo de Jesuo venos kiam Li elverŝos sian sangon sur la kruco, la nova interligo ne estos kiel la malnova, kiu estis farita per la sango de la junaj bovinoj, sed ĝi estos farita per la sango mem de Jesuo, nome per la sango de la filo de Dio.

“Lia patrino –kaj la trian fojon aperas tiu ĉi vorto, la numero tri en la hebrea simbologio signifas kio estas kompleta, kio estas plena- “diris al la la servantoj”, kaj tie ĉi la evangeliisto uzas la vorton ‘diakonos’, kiu ne signifas tiuj kiuj devas servi sed indikas tiujn kiujn vole, pro amo, sin metas je la servo de la aliuloj.

“Kion ajn li diros al vi, tion faru”. La respondo de la patrino de Jesuo, ŝia invito reeĥas tion kion la popolo diris al Moseo post la interligo “Kion la Sinjoro diris ni tion faros”. Do, ni vidas kiel ĉio rilatas la interligon.

“Estis tie tri akvokuvoĵoj”, la numero sep indikas la tutecon, la numero ses indikas la neperfektecon, do estas io malperfekta. Tiuj ĉi akvokuvoĵoj krome estas el ŝtono, ne el argilo, do ili estis pezaj kaj ne movigeblaj. Al kio ili devis utili? Ili devis utili al “rita purigo”- tie ĉi la teksto diras “rita”, sed en la origina teksto ne estas “rita purigo”, en ĝi troviĝas:” metitaj laŭ la purigo de la Judoj”.

Jen en la centro de tiu ĉi rakonto la evangeliisto indikas la kialon pro kio la amo mankas. Kial mankas la amo? Ĉar rilato kun Dio kiu baziĝas sur la observado de la leĝo ĉiam sentigis la popolon malindan, ĉiam kulpan, kaj kiam oni sin sentas ĉiam kulpa, oni ne povas elprovi la amon de Dio. Jen la problemo kiu enestas en tiu geedziĝo kie mankas la vino, tie mankas la amo, temas pri purigado. Estas religio, leĝo kiu ĉiam sentigis la homojn malindaj kaj ĉiam kulpaj.

Kaj eĉ la evangeliisto diras ke la akvokuvoj devis enteni ĝis pli ol sescent litroj da akvo, do estas ĉiam tiu peza kovro de la purigo. Kaj jen la interveno de Jesuo: “Plenigu la akvokuvojn per akvo”, la akvokuvoj neniam entenos la akvon por la purigo, estos Jesuo kiu donacos tiun akvon por la purigo.

“Ĉerpu nun, kaj alportu”- la unuan fojon aperas tie grava rolanto kiu estas la festenestro. Dum tiuj ĉi festenoj kiuj daŭris eĉ plurajn tagojn, estis iu ŝarĝita kontroli la disvolviĝon de la festeno, kaj antaŭ ĉio li devis prizorgi la manĝovarojn. Nu, tiu grava rolanto ne rimarkas la mankon de vino.

La rolanto en la greka lingvo nomiĝas “arkitrikino” kaj la komenco de tiu vorto estas la sama per kiu komenciĝas la vorto “ĉefsacerdoto” kaj li simbolas la popolestrojn. La popolestroj ne konscias pri la situacio de la popolamaso kiu estas sen amo. Al ili tio ne interesas. Nu, Jesuo diras: “Ĉerpu nun, kaj alportu al la festenestro. Kaj oni alportis. Kiam la festenestro gustumis la akvon, nun fariĝintan vino”, la akvokuvoj neniam entenos la vinon, kiu simbolas la Sanktan Spiriton kiun Jesuo elverŝos, sed la akvo fariĝas vino kiam ĝi estas ĉerpita el la akvokuvoj.

Fakte la evangeliisto diras “sciis tamen la servantoj, kiuj ĉerpis la akvon”, do en la akvokuvoj estas akvo, sed kiam ĝi foriras ĝi fariĝas vino, ĉar la vino estas la donaco de Jesuo, ĝi estas la nova interligo kiu baziĝas sur la amo. “La festenestro ne sciis, de kie ĝi estas, sciis tamen la servantoj, kiuj ĉerpis la akvon”, kaj tie, strange la tradukisto eliminis la vorton “architricino”, la festenestro kiu aperas la trian fojon.

Kaj tiu forigo estas domaĝo ĉar la evangeliisto kontraŭmetas la trifojan mencion de la patrino de Jesuo, la fidela popolo zorgoplena pri la manko de vino, tri fojojn li mencias la festenestron, kiu simbolas la popolestrojn, kiuj ne rimarkas la mankon de vino. Sed ili ne nur tion ne rimarkas, alvenas eĉ la protesto.

Fakte: “Li alvokis la fianĉon” finfine aperas la fianĉo – ĉiuj rolantoj estas anonimaj, nur Jesuo havas la nomon – kaj li riproĉas la fianĉon, li diras:” : Ĉiu homo prezentas unue la bonan vinon, kaj kiam oni jam drinkis, tiam la malpli bonan; sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun”. Laŭ la eminentuloj la bonaĵo apartenas al la pasinteco. Por ili estas nekonceptebla afero ke la bono, la belo, io pli bona devas ankoraŭ alveni. Do, la evangeliisto pere de tiu festenestro simbolas la etkomprenemon de la religiestroj.

Konklude:” Ĉi tiun komencon de signoj Jesuo faris en Kana Galilea”- jen la malnova traduko uzis la netaŭgan vorton “miraklon”, kiu neniam estas uzita de la evangeliistoj por indiki la agojn de Jesuo, sed ĉi tie oni tradukas tion per la vorto “signoj” faritaj de Jesuo; Li, fakte, “elmontris sian gloron”. Estas surprizige trovi ĉe la fino de tia evangelipeco la ununuran fojon la vorton “gloro” rilate tiun okazintaĵon.

Estas strange, ni estus atendintaj ke Jesuo manifestus Sian gloron ĉe la resurekto de Lazaro, ĉe la multobligo de la panoj kaj de la fiŝoj. Ne! La gloro de Jesuo manifestiĝas en tiu evangelipeco. Kial? Ĉar, kiel ni jam diris, la evangeliisto proponas la novan interligon kaj, kiel post la proklamo de la interligo sur la monto Sinajo Dio elmontris Sian gloron, per tiu nova interligo, Jesuo elmontras Sian gloron.

Kiu estas tiu ĉi nova interligo? Dum la malnova interligo baziĝis sur la leĝo kaj la homo devis meriti la amon de Dio kaj li ĉiam sin sentis malinda je tio, jen la akvokuvoj por la purigo, en la nova interligo la amo estas donita, ĝi estas donacita kaj la homo devas nur ĝin akcepti. Tiu estas la bona novaĵo alportita de Jesuo.

”